Veksilologia revuo en Esperanto

# VENTO

Numero 12 Aprilo 2025



# VENTO

**Veksilologia revuo en esperanto**

Eldonita de Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo
kun la kunlaboro de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

Adresoj: vento@esperanto.ac

Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

*Editada en Córdoba (España) por la Asociación Andaluza de Esperanto.*
Eldonita en Kordovo (Hispanio) de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo.

| ENHAVO | Paĝo |
|---|---|
| Flagoj ene de flagoj | 3 |
| La flago de Palaŭo | 13 |
| La flago de la nederlanda kolonio Surinamo | 16 |
| Hispana influo sur la flagoj de kelkaj usonaj ŝtatoj | 18 |
| Lastaj informoj pri flagoj | 21 |
| La fotografaĵo de niaj legantoj | 23 |
| Kio estas FIAV? | 24 |
| Plie pri duon-hisitaj Esperanto-flagoj | 27 |
| Veksilologia kuriozaĵo | 29 |
| La angulo de la blazonoj: *Kroatio* | 31 |
| Flagoj kaj Poŝtmarkoj: *Usonaj ŝtataj flagoj omaĝe al Ducentjariĝo de Usono.* | 32 |
| Trovu la eraron! | 33 |
| Kiel kunlabori kun VENTO | 34 |
| Demarŝoj por la laŭleĝa fondiĝo de VENTO | 35 |
| Veksilologia Humuro | 35 |

Kunlaboris ĉi-numere: Cristina Bollini, Alejandro Burgos Escalante,
Lucas Toczki kaj José María Rodríguez (red.).
Sur la kovrilo foto de Suso Moinhos.

*Ĉi tiu revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn. La apero de flagoj kaj simboloj en la revuo tute ne montras apogon aŭ rifuzon al la ideoj, ŝtatoj, regionoj aŭ asocioj de ili reprezentataj. La sola apogo de nia revuo rilatas al la Internacia Deklaro de Homaj Rajtoj kaj al la adopto de la internacia lingvo Esperanto kiel komunikilo por la tuta homaro.*


# Flagoj ene de flagoj


✍ *José M. Rodríguez (Hispanio)*


Taŭga difino de la vorto *flago* povus esti "simbolo kie aperas pliaj simboloj". Ĉi tiuj lastaj estas ĉies konataj, tiel steloj, suno, luno, bestoj ktp, estas oftaj simboloj aperantaj sur flagoj, kiuj ja estas aliaj simboloj. Eĉ flagoj povas aperi ene de aliaj flagoj, kun la senco esprimi ion. Ni parolus do, pri flagoj ene de flagoj, aŭ eĉ pri iaspeca *meta-veksilologio*.

Sendube, la plej konataj ekzemploj pri flagoj ene de flagoj estas la brita standardo, kiu aperas ene de multaj aliaj flagoj, ĉu naciaj aŭ teritoriaj, ĝuste ĉe la supra maldekstra angulo de tiuj flagoj. Ni vidu la kialon.

Ĝis la jaro 1864 tri eskadroj formis la britan mararmeon. Ĉiu el ili havis similan insignon, kvankam kun malsimila koloro, ni vidu ilin:








Ĝenerale, la teritorio kolonigiita de la Brita Imperio adoptis la flagon de la brita konkeranta eskadro. Tiel, ekzistas malsimilaj flagoj surbaze de tiuj standardoj, al kiuj aldoniĝis specifaj simboloj de ĉiu teritorio, ĝenerale aperanta meze de la flago mem. Post sendependiĝo, multaj el tiuj teritorioj ŝanĝis siajn flagojn, kvankam ankoraŭ multaj el ili, eĉ jam ŝtatoj, ankoraŭ konservas tiun tradician mararmean standardon kiel nacian flagon. Tamen, en la plejmulto el ili okazas debatoj pri la taŭgeco adopti novan kaj malsimilan flagon ĉar, vole ne-vole, tiuj standardoj memorigas pasintajn koloniismajn epokojn.

Ni vidu kelkajn ekzemplojn.

• Sendependaj ŝtatoj kiuj ankoraŭ konservas britan mararmean flagon:




Aŭstralio




Bermudo

• Sendependaj ŝtatoj kiuj ŝanĝis sian flagon post sendependiĝo:




Ĝis 1965

Kanado




Depost 1965





Ĝis 1985

Sankta Vicento kaj la Grenadinoj



Depost 1985

La brita flago aperanta sur la supra angulo montras, ke tiu teritorio estas aŭ estis brita kolonio, kaj nun membro de la brita komunumo de nacioj, sendepende de la koloro kiu aperas sur la cetera parto de la standardo. Tio estas, ne nur la ruĝa aŭ la blua koloroj estis la sole uzitaj en la koloniigitaj teritorioj de la Brita Imperio, tiel, ekzistas flagoj kie aperas, aŭ aperis, aliaj koloroj, ekzemple:




Fiĝioj




Niuo

Okaze de la sendependiĝo de Fiĝioj, oni anstataŭis la tipan bluan koloron, pere de alia pli hela bluo, simbolo de la akvoj de la Pacifika Oceano, kiu ĉirkaŭas la insularon. Same, rilate Niuon, kiu adoptis la flavan koloron, simbolo de la suna lumo.



Irlando en 1921




Proponita por Barato 1917


La flago de la irlanda kolonio ĝis la jaro 1921 montris la tipan verdan koloron de la insulo. Same, la proponita flago en la jaro 1917 por onta sendependa Barato ankaŭ montris la britan flagon, kvankam ne uzis la tradiciajn bluan aŭ ruĝan kolorojn por la cetera flago.

Rilate la britan flagon eĉ troviĝas kurioza ekzemplo, tiel ekzistas flago kie aperigas du-foje tiun standardon, temas pri la flago de la antikva kolonio de Brita Honduraso, nuntempe sendependa ŝtato Belizo. Sur tiu flago aperis dufoje la brita standardo, unue sur la tradicia supra angulo kaj due sur la insigno de la kolonio.

Kolonio Brita Honduraso




Unu el la plej ŝokaj ekzemploj pri flago ene de alia flago estas la standardo de Havajo. Ĉi tiu usona ŝtato neniam estis brita kolonio, tamen sur ties flago aperas la brita standardo, simile al tiuj britaj eks-kolonioj antaŭe viditaj. Laŭ tradicia rakonto, okaze de vizito de brita milit-ŝipo en la insularon, la oficiro George Vancouver donacis britan flagon al tiama havaja reĝo Kamehameha. Depost tiam la brita flago aperas sur la havaja standardo.




Havajo

Ne nur Britio metis sian flagon sur tiujn de koloniaj teritorioj kun la celo sciigi pri la metropolo, Francio agis same, kvankam ne tiel ofte. Rilate la francan flagon, ĝi aperas videble sur la flagoj de la franca kolonio Valiso kaj Futuno en la Pacifika Oceano. La teritorio havas apartan statuson, kiu agnoskas la regpovon de tri reĝlandoj ekzistantaj en la kolonio: Uveo, Alo kaj Sigavo. Jen la flagoj de la kolonio kaj de la malgrandaj regnolandoj.



Franca transmara kolektivo Valiso kaj Futunuo



Uveo



Alo




Sigavo

Alia kialo por aperigi flagon ene de flago estas memorigi la naciojn kiuj helpis krei ŝtatojn. Tio okazis sur la antikva sud-afrika flago. Tiel, meze de la tiama, ĝis 1994, sud-afrika flago aperis tiuj de Britio, Oranĝa Libera Ŝtato kaj Transvalo. Kurioze, ene de la flago de la Oranĝa Libera Ŝtato siajfoje aperas ankaŭ tiu de Nederlando. Do, la antikva sudafrika flago havas ene de si flagon sur kiu aperas alia flago. Okulfrape,tiu flago nur memoris la blank-haŭtajn fondintojn de la Sudafrika Respubliko kaj tute forgesis la originajn enloĝantojn de la teritorio. La fino de la rasa apartigo en Sudafriko ŝanĝigis la flagon.



Sudafriko ĝis 1994



Britio




Oranĝa Libera Ŝtato




Transvalo


Same okazas norde de la amerika kontinento, la ne-oficiala flago de la franca teritorio de Sankta-Piero kaj Mikelono ankaŭ memorigas la eŭropajn regionojn el kie venis homgrupoj kiuj instalis sin en la insularo. Vere la flago ne estas oficiala, tamen ĝi estas uzata en tiu franca komunumo, kaj inspirita sur la oficiala blazono de la teritorio. La flago memorigas la navigantojn de Basklando, Bretonio kaj Normandio.



Sankta-Piero kaj Mikelono



Basklando




Bretonio




Normandio

Troveblas ĉe la Pacifika Oceano alia flago kiu povus pensigi, ke ene de ĝi, alia aperas, tamen tio ne okazas. Ni vidu: temas pri la flago de la Polinezia regno Tongo, antaŭe nomata la Amikaj Insuloj. Tongo nuntempe estas sendependa reĝlando en la Brita Komunumo de Nacioj. Jen la flago de ĉi tiu arkipelago:




Tongo



Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco

Ĉu oni povus diri, ke la flago de la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco aperas ene de la Tonga flago? Vere tio ne okazas. La unua dezajno de la Tonga flago aperis en la jaro 1862 laŭ jene:



En tiu jaro, la reĝo George Toupou la 1-a sciigis, ke sur la flago de la nova reĝolando devus aperi la kruco kaj la ruĝa koloro de la Redemptoro Jesuo. Tamen, nur unu jaron poste, en 1863, la Internacia Komitato de la Ruĝa Kruco aprobis sian ĉefan simbolon, kiu estis tute simila al la Tonga flago. Do, por eviti konfuzojn, oni decidis enmeti la originalan Tongan flagon ene de supra angulo, simile al ŝipaj flagoj. Tiujare oni aprobis ankaŭ, ke ĝi estus la definitiva kaj porĉiama flago de la regnolando.

Do, kvankam unuavide oni povas pensi, ke la flago de la Ruĝa Kruco aperas ene de la Tonga flago, vere tio ne okazas.

Ofte, flagoj de internaciaj organizoj aŭ aliancoj aperigas en siaj flagoj la standardojn de tiuj ŝtatoj membroj de tiu organizo. Ĉi tio okazas, ekzemple, rilate la flagon de la Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj (OAŜ). Temas pri la ĉefa internacia organizaĵo apartenanta nur al amerika kontinento. En ĝi membriĝas 34 ŝtatoj, kies flagoj videblas sur la flago de la organizaĵo ene de blanka cirklo meze de la flago.



Organizaĵo de Amerikaj Ŝtatoj

Kvankam OAŜ fondiĝis en la jaro 1948, oni ne adoptis oficialan flagon ĝis la jaro 1961. Pro la fakto, ke sur la flago devas aperi la standardojn de ĉiuj membro-ŝtatoj ĝi ŝanĝiĝas, kiam novaj membroj aliĝas al organizaĵo. Tio okazis en la jaro 1991, kiam Belizo kaj Gujano estis akceptataj kiel membroj de OAŜ. La lokigo de la flagoj sekvas alfabetikan ordon, kiu komenciĝas sube laŭ la jena movo:







1-a Antigvo kaj Barbudo

35-a Venezuelo

Kiel kuriozaĵo oni devas diri, ke kvankam nuntempe al OAŜ apartenas 34 ŝtatoj, sur la flago aperas 35 flagoj. Tio okazas pro la fakto, ke la flago de Nikaragvo ankoraŭ aperas sur la standardo de la organizaĵo, kvankam ĝi malaliĝis en la jaro 2023.

La lasta flago kun flagoj pritrakota ĉi-numere estas tiu de la Internacia Koncesio de Ŝanhajo en Ĉinio. Post la malvenko de Ĉinio dum la opiaj militoj inter la jaroj 1839 kaj 1842, la Ĉina Imperio estis devigata malfermi siajn havenojn al eksterlanda komerco kaj permesi la instalon de eksterlandanoj en sia teritorio. Kelkaj traktatoj poste subskribitaj inter Ĉinio kaj aliaj potencoj, konataj kiel "Neegalaj Traktatoj" pro la ne-egala pozicio inter subskribantoj, devigis al Ĉinio cedi la administracion, ne la suverenecon, de kelkaj gravaj haven-urboj.

Unu el tiuj urboj estis Ŝanhajo. Tiel, en la jaro 1863, akorde al tiuj traktatoj, fondiĝis la Internacia Koncesio de Ŝanhajo, laŭ kiu civitanoj de la konataj kiel "favorigitaj nacioj" ĝuis eksteordinarajn kaj eksterteritoriajn rajtojn en la urbo. Komence tiuj nacioj estis 14, kvankam iom post iom aliaj aliĝis al pakto kaj fine ili estis 19, tiel Aŭstrio, Belgio, Brasilo, Britio, Danlando, Francio, Hispanio, Italio, Japanio, Kubo, Meksikio, Nederlando, Norvegio, Peruo, Portugalio, Prusio, Svedio, Svisio kaj Usono. La ĉina enloĝantaro de la urbo kaj civitanoj de aliaj nacioj restis sub la ĉina administracio.


La koncesio havis propran flagon, vere iomete ĥaosa, sur kiu aperis la naciaj flagoj de multaj, ne ĉiuj, el la unuaj ŝtatoj kiuj subskribis la akordon. Jen ĝi:





Internacia Koncesio de Ŝanhajo

Kune kun la anglalingva mencio de la urba administracio de la urbo: *Shanghai Municipality*, aperis en la latina kaj en la ĉina lingvo la devizo de la koncesio: "*Omnia Juncta In Uno*" (Ĉiuj unuigitaj en unu). La flagoj aperantaj sur tiu de la koncesio estas jenaj: Britio, Usono, Francio, Prusio, Italio, Rusio, Portugalio, Danlando, Svedio-Norvegio, Aŭstrio, Hispanio kaj Nederlando.


Jen la flagoj aperantaj sur la flago de la Internacia Koncesio de Ŝanhajo, kompreneble temas pri la naciaj flagoj kiam la traktato estis subskribita, do, ne necese koincidas kun tiuj aktualaj.


Britio



Usono (1863)


Francio


Prusio



Itala Regnolando


Rusio



Danlando


Portugala Regnolando


Aŭstrio


Sved-Norvega Unio


Nederlando


Hispanio
Flago de la komerca ŝiparo

Kiel dirite, ne ĉiuj ŝtatoj subskribantaj la traktaton pri Ŝanhajo aperas sur la flago kaj eĉ unu el ili, la flago de Prusio, malaperis post la unua mond-milito. La loko antaŭe okupita de la prusia flago ne estis anstataŭigita de alia flago, ĝi simple malaperis en la versioj de la flago de la Koncesio post 1919, kiu aperigis simplan blankan spacon anstataŭ la prusian flagon. Invado de la japana armeo al la urbo dum la dua mond-milito metis finan punkton al la Internacia Koncesio de Ŝanhajo.

# La flago de Palaŭo

Cristina Bollini (Italio)



Situanta en la Pacifika Oceano, proksimume 500 km Oriente de Filipinio, la malgranda insula ŝtato Palaŭo, ankaŭ konata kiel Belau, kun ĝiaj 458 km kvadrataj kaj ĝiaj 21.000 loĝantoj, estas unu el la plej malgrandaj kaj malplej loĝataj ŝtatoj en la mondo. Palaŭo atingis plenan sendependecon en 1994, pro tio ĝi estas unu el la plej junaj ŝtatoj en la mondo.

La unuaj loĝantoj de Palaŭo verŝajne alvenis el Indonezio ĉirkaŭ 1000 a.K.; kelkaj fontoj asertas ke la nomo de la ŝtato mem devenas de la vorto "pulau", kiu, en la indonezia lingvo, signifas ĝuste "insulo". Alia interpreto de la nomo devenas de loka legendo kiu rakontas ke la insuloj estis formitaj de la bruligita korpo de la Dio Chuab.

Oni diras ke, iam, homoj kaptis kaj ligis la Dion mem, kaj konstruis sub li grandan fajron. Dio, kiu ne komprenis tion, kio okazis, tiam demandis al la ĉeestantaj homoj: "Kion vi faras"? Respondis ili: "Ni nur faras fajron". Sed Dio Chuab rimarkis la trompon, kaj ekkriis: "*Oh melau*", kiu signifas: "Vi trompas min". De la vorto "melau" devenas "Belau", kiu, iom post iom, ŝanĝiĝis al "Palaŭo".

Dum la jaro 1543 la hispanoj alvenis sur la insulojn, kaj koloniigis ĝin en la 18-a jarcento. Poste ili vendis al Germanio la insulojn en 1899. Komence de la unua Mondmilito, Japanio okupis la insulojn, ĝis la fino de la dua Mondmilito, kiam Japanio, perdinte la militon, cedis la tutan insularon al Usono, kiel parton de la "*Trust Territory*" de la Pacifikaj Insuloj.

En la jaro 1979 loĝantaro voĉdonis por ratifi unuiĝon kun la Federaciaj Ŝtatoj de Mikronezio.La plimulto esprimis kontraŭan opinion kaj tial, post ĝenata periodo dum kiu mulnombraj registaroj kaj eĉ kelkaj krimoj alternis, en la jaro 1994 finfine Palaŭo atingis plenan sendependecon.

La flagoj de Palaŭo sekvas la historion de la insulo kaj de ĝiaj dominadoj; fakte, ĝis 1899 estis uzata la tiama hispana flago, poste anstataŭigita per la germana imperiestra flago, kaj poste per la japana, kiu ŝajne inspiris la dezajnon de la nuna flago.



Hispana flago en Palaŭo ĝis 1899




Germana imperia flago 1899-1914

Poste (de la jaro 1914 ĝis la 1981), la flago de Usono estis uzata ĝis sendependiĝo.

La nova flago de Palaŭo estis oficiale adoptita la 1an Januaro 1981, ĝi havas la proporciojn 3:5. Sur ĝi estas reprezentanta lazura ĉiela fono, sur kiu aperas, iomete lokigita ĉe la masto, flav-oran diskon.

La flago tre similas al tiu de Japanio, sed la signifo estas tute malsama. Fakte, flava disko reprezentas lunon, antitezo de la suno, kiu aperas sur flago de Japanio.



La koloro (ĉielblua, lazura ĉiela) elektita reprezentas la laŭgrandan transiron de eksterlandaj dominadoj al sendendepeco, kaj la simbolo de luno originas el lokaj tradicioj.



La ĝenerala dezajno de la flago de Palaŭo kongruas kun la figuro de la luno, kiu elstaras kontraŭ la ĉielo, kaj esprimas rilatojn kiuj ĉiam ligis la loĝantojn al la luno mem kaj al ĝiaj lunfazoj. La insulanoj opinias, ke la plenluna periodo estas la plej favora por iu ajn homa aktiveco. Semado, rikolto, fiŝkaptado, kiam farite dum la plenluno, ŝajnas esti pli enspezigaj.

Alia simbola agado de insulo, kuj estis farita eĉ sub la lumo de la luno, estas la ĉizado de tradiciaj kanuoj. Dum la plenluno okazas ankaŭ ĉiuj festadoj kaj ritoj ligataj al la folkloro kaj al la insula historio. Oni ne forgesu, ke luno regas ankaŭ la tajdojn, kiuj, por insulara ŝtato, markas la ciklon de la tago, eĉ pli ol la levigo kaj subiro de la suno.

Sed, luno, estas ankaŭ simbolo de amo, de paco, kaj de trankvileco. Luno estas silenta, ĉiam ni levas la okulojn al la ĉielo por vidi ĝian belecon. Entute, la flago de Palaŭo reflektas la lokan historion kaj tradiciojn de la malgranda ŝtato.

Informo de la redakcio de la revuo.
Sur kelkaj artikoloj, la flagoj reprezentataj aperas kun griza aŭ nigra kontur-linio




Ĉi tiun grafikan rimedon ni uzas NUR kiam la flago aŭ parto de la flago reprezentanta estas blank-kolora. Ni tiel celas videbligi kiel eble plej bone la flagon reprezentatan. Kompreneble tiuj nigraj aŭ grizaj linioj reale ne aperas sur la flago.

# La flago de la nederlanda kolonio Surinamo

*Lukas Toczki*

En la jaro 1954 oni aprobis la Ĉarton de la Reĝlando Nederlando, laŭ kiu la reĝlando konsistis el tri landoj, tio estas, Nederlando, Nederlandaj Antiloj kaj Surinamo. Kelkajn jarojn antaŭe, en 1941, la nederlanda registaro, tiam ekzilita pro la germana okupo dum la dua mondmilito, promesis finigi la kolonian situacion de nederlandaj posedaĵoj, inter ili Surinamo en Sudameriko. Oni promesis havigi al tiuj teritorioj pli vastan aŭtonomecon. En la jaro 1975 Surinamo, la eksa Nederlanda Gujano, finfine sendependiĝis.

Kiel dirite, en la jaro 1954 Surinamo fariĝis unu el la landoj kiuj formis Nederlandon, antaŭe simple ĝi estis kolonio de Nederlando. Tiel, en 1954, kiel lando, Surinamo adoptis propran flagon. Ĉi tiu standardo, el la veksilologia vidpunkto, ja estas vere bela kaj tute malsimila al ĉiuj aliaj flagoj. Eble, la plej simila ekzemplo estis la flago de la Internacia Olimpika Komitato. Jen la surinama flago dum la kolonia periodo




Sur la flago aperas tiom da diverskoloraj steloj kiel etnaj grupoj ekzistas en Surinamo. La nigra stelo reprezentas la afrik-devenan grupon, tiu bruna la hindojn, la flava stelo la ĉinojn, la ruĝa la amerikajn indiĝenojn kaj la blanka stelo simbolas la eŭropanojn. Ĉiuj ili estas ligitaj sur la flago de elipsa nigra ringo, kun la signifo: unuiĝo. Pro la fakto, ke la blanka stelo ne estus videbla, la marĝenoj de ĉiuj steloj estas nigraj.

Kelkajn komentojn estas necese sciigi pri la steloj kaj ties pozicio sur la flago. Sur la normo aprobanta la flagon, nenion oni diras pri la konkreta orientiĝo de ĉiu stelo rilate la supran pinton. Tiel, sur kelkaj desegnoj, la steloj aperas ĉiam supre orientitaj, tamen la originala versio de la flago montras la stelojn orientitajn laŭ ties pozicio ene de la elipso, tiel, nur la supra stelo, tiu nigra, aperas orientita rekte.




Poŝtmarko eldonita de la kolonia poŝta servo de Surinamo komence de la 60-a jardeko



Flago de la kolonia guberniestro inter la jaroj 1966 kaj 1975

Rilate la ĝustan pozicion de ĉiu stelo sur la flago, la ĉefa kialo estis decidi kiu stelo okupas la supran pozicion, sendube la plej grava ĉe la simbolo. Pro la fakto, ke ĉiu stelo reprezentas malsimilan etnan grupon, tiu centra kaj supra pozicio determinus kiu estas la plej grava grupo, almenaŭ el la simbola vidpunkto. La decidon prenis la propra dezajnanto de la flago, S-ro Frank Essed, surinama politikisto kiu apartenis al la afrik-devena etno. Tiel, li mem lokigis la nigran stelon de sia grupo sur la plej pinta pozicio.



En la jaro 1975 Surinamo komplete sendependiĝis. La nova registaro organizis konkurson por adopti novan nacian flagon. Oni prezentis 270 malsimilajn projektojn. En tiu jaro la surinama flago kun tiuj kvin steloj, ja originala el la veksilologia vidpunkto, ĉesis esti la oficiala simbolo de la teritorio.

# Hispana influo sur la flagoj de kelkaj usonaj ŝtatoj

*José María Rodríguez*



Flagoj en fortreso de Porto-Riko

(Antikva hispana standardo, Usono kaj Porto-Riko)

Dekkvino da usonaj ŝtatoj iam estis teritorioj de la hispana regnolando, kelkaj el ili eĉ iufoje apartenis al Meksikio, kiu estis vicreĝolando de la hispana krono. Krome, la helpo de Hispanio favore al la lukto por la sendependiĝo de tiuj dek tri kolonioj, kiuj ribeliĝis kontraŭ Britio, estis decida, laŭ iama deklaro de George Washington.

Ĉi tiu hispana influo favorigis la disvastigon de hispanaj geografiaj nomoj kaj simboloj tra la tuta usona geografio. Ni parolu nun pri la flagoj de usonaj ŝtatoj kie videblas hispanaj simboloj.

Ses usonaj ŝtatoj iamaniere montras en siaj flagoj la hispanan influon sur la usona historio. Kelkaj el ili reproduktas la burgonjan krucon, unu el la plej konataj simboloj de la tiutempa hispana regnolando.

**ALABAMO**



Aprobita en la jaro 1895, la flago de Alabamo memorigas la flagon tie flirtantan ĝis la jaro 1810, kiam Alabamo estis parto de la hispana teritorio de Florido. La ruĝa ikso-forma flago reprezentas la krucon de Sankta Andreo, simbolo uzita de la hispana armeo de la jaro 1525 ĝis la komenco de la 19-a jarcento. La unuaj eŭropaj esploristoj, estritaj de la hispano Hernando de Soto, alvenis en Alabamon en la jaro 1540.



**ARIZONO**

Oni oficialigis la arizonan flagon en la jaro 1917. Sur la standardo aperas stelo el kupro, simbolo de la grava min-industrio de Arizono, kiu leviĝas el blua kamparo. La stelo radias 13 sun-radiojn, kiuj reprezentas tiujn 13 originajn ŝtatojn de Usono. Tamen, anstataŭ uzi la tradiciajn blankan kaj ruĝan kolorojn, oni decidis aperigi la kolorojn ruĝan kaj flavan, omaĝe al hispana flago. Hispanoj alvenis en Arizonon en la jaro 1540, okaze de ekspedicio estrita de Francisco Vázquez de Coronado.




**ARKANSASO**

Proponita en la jaro 1912 kaj oficialigita en 1924, la flago de Arkansaso konsistas el ruĝ-kolora kampo sur kiu aperas blanka diamanto el blua bordo. Ene de tiu bordo aperas 25 steloj, ili sciigas, ke Arkansaso estis la 25-a ŝtato aliĝinta al Usono.

En la mezo de la diamanto aperas 4 steloj kaj la nomo de la ŝtato. Ĉi tiuj kvar steloj simbolas tiujn kvar ŝtatojn kiuj iam regis la teritorion. Supre, Usono mem, al kiu Arkansaso aliĝis en la jaro 1836. La subaj steloj reprezentas Hispanion, Francion kaj la Konfederaciitajn Ŝtatojn de Ameriko.




**FLORIDO**

Aprobita per referendumo en la jaro 1900, en la komenco la flago de la usona ŝtato Florido estis blanka, kaj meze aperis la blazono de la ŝtato. Okaze de la oficialigo de la flago, oni aldonis ruĝan krucon de Sankta Andreo, kun la sama signifo ol la flago de Alabamo, tio estas memorigi la hispanan flagon, kiu flirtis en la teritorio ĝis la definitiva cedo de Florido fare de Hispanio al Usono en la jaro 1821.




## MONTANO

Sur la flago aperas la nomo de la ŝtato mem: MONTANA. La nomo devenas de la hispana vorto *"Montaña"*, kies signifo estas "Monto". La siatempaj hispanaj esploritoj nomis la teritorion "Montaña del Norte" (Norda Monto).

La flago estas blukolora, meze aperas la blazono de la ŝtato kaj ene de ĝi, hispanlingve, la devizo "Oro y Plata" (Oro kaj Arĝento). Vere, hispana influo en ĉi tiu ŝtato ne estis tiel grava tra ties historio, tamen flago kaj blazono memorigas hispanojn pere de la nomo mem de la ŝtato kaj la uzo de hispanlingva devizo.

## NOV-MEKSIKO



Oficialigita en la jaro 1925, la flago de Nov-Meksiko reprezentas sunon, kiu estas la simbolo de la indiĝena popolo Ziao. La ruĝa suno enkadriĝas meze de flava ŝtofo. Laŭ la teksto de la normo aprobanta la flagon, ambaŭ koloroj, flava kaj ruĝa, honorigas al la hispana reĝino Izabela la Katolika kaj al konkistadoroj, kiuj esploris la regionon ŝianome. La hispana regnolando regis la teritorion dum pli ol 300 jaroj. Laŭ decido de Nordamerika Veksilologia Asocio, la flago de Nov-Meksiko havas la plej belan dezajnon inter ĉiuj flagoj de Usono kaj Kanado.



# Lastaj Informoj pri Flagoj



## Leĝo en Danio malpermesas aliajn flagojn

Nova leĝo en Danio malpermesas flirtigi eksterlandajn (t.e. nedanajn flagojn) ĉe publikaj spacoj. La nova normo ekvalidis la 1-an de januaro 2025, kaj ties celo estas certigi la plej supran gravecon de la dana flago. La leĝo permesas hisi eksterlandajn flagojn nur ĉe ambasadejoj kaj konsulejoj kaj kaze de specialaj permesoj, kiel la uzo de la ukrainia flago, kiun oni povas hisi por montri apogon kontraŭ la rusa invado.

La neceso disponi pri ĉi tiu nova leĝo ekokazis en la jaro 2016, tiam dana civitano hisis usonan flagon en sia domo kun la celo sciigi pri sia amo al usona muziko. Ĉi tiu akto ricevis plendojn de la ceteraj enloĝantoj de la urbo, ĉefe kiam la usona flago flirtis dum la plej gravaj festoj de Danio. Post denunco kontraŭ tiu civitano, la jura kazo atingis eĉ la Superan Tribunalon, kiu en la jaro 2023 juĝis, ke la malpermeso hisi eksterlandajn flagojn ne havis sufiĉan leĝan bazon. Do, la ministro pri justico decidis redakti novan leĝon pri ĉi tiu afero.

La nova normo ĉefe tuŝos eksterlandajn komunumojn en Danio, kiuj emas montri fieron pri siaj originoj. Laŭ kalkuloj 20 % el la enloĝantaro havas eksterlandajn radikojn, ĉefe germanaj elmigrintoj kaj lastatempe de Rumanio kaj Sirio, kiuj nun ne rajtos flirtigi siajn naciajn flagojn.



# La usona ŝtato Utaho prezentis sian novan flagon

La 2-an de marto 2023 la ĉambro de reprezentantoj de la usona ŝtato Utaho aprobis leĝon por adopti novan flagon de tiu ŝtato. La proceduro por disponi pri nova flago komenciĝis en la jaro 2018. Sur la nova flago aperas tri horizontalaj bendoj.

La plej supra bendo estas blukolora, ĝi reprezentas la ĉielon kaj la lagojn de la ŝtato, krom la principojn pri fido, sciado, libereco kaj optimismo. La centra bendo, blankolora, reprezentas la montaron, pro tio, ne temas reale pri tute horizontala bendo, ĝi sekvas la reliefon de la montoj mem. La suba bendo, ruĝkolora, memorigas la pejzaĝojn de la ŝtato.



Meze de la flago aperas heksagono, ene de kiu enkadriĝas abelujo. Ĝi reprezentas la unuiĝon kaj la agemon de la ŝtato mem. Sub la abelujo aperas stelo, simbolo de ĉiu ŝtato en Usono. Ĉi tiuj tri koloroj, blua, blanka kaj ruĝa estas la tipaj koloroj de la simbolaro de Usono.

La nova flago estis prezentita oficiale en la monato marto 2024.



# Post la revolucio, nova flago en Sirio

En la monato decembro 2024 akriĝis civila milito en Sirio. Tiam la ribelantaj trupoj eniris en la ĉefurbon Damaskon kaj la, ĝis tiam, prezidanto Bashar al-Asad forfuĝis en Rusion. Unu el la unuaj decidoj de la nova reĝimo estis ŝanĝi la nacian flagon. Reale ne temas pri nova flago, ĉar temas pri la standardo adoptita en la jaro 1932, okaze de la sendependiĝo de Sirio. Ĝi flirtis ĝis la jaro 1958, tiam Sirio kuniĝis kun Egiptio kaj konsistigis la Unuiĝintan Araban Respublikon, kiu enkondukis novan flagon.

Nun, tiu antikva siria flago reoficialiĝis. La koloroj de la siria flago reprezentas la diversajn imperiojn, kiuj regis tiun regionon tra jarcentoj.



La verda koloro reprezentas la Fatimidan kaliflandon, la blanka bendo la Omajadan kaliflandon kaj la nigra estas la koloro de la Abasida kaliflando. La ruĝaj steloj sur la centra bendo reprezentas la distriktojn kiuj formis la respublikon: Aleppo, Damasko kaj Deir es Zor.



# La fotografaĵo de niaj legantoj




Vatikanurba flago flirtas duonhisite pro la forpaso de
la Papo Benedikto la 16-a Januaro 2023
Fotis: Pastro P. Lora.

*Ni invitas ĉiujn legantojn partopreni en ĉi tiu sekcio. Se dum promenado tra via urbo, vi vidas flirtantan flagon, ne hezitu fotografii ĝin. Sciigu al ni pri loko kaj dato de la fotografaĵo, kompreneble ankaŭ pri kiu flago temas.*

*NI ATENDAS VIAJN FOTOGRAFAĴOJN !*

# Kio estas F.I.A.V. ?

Ni parolas pri la Federacio Internacia de Asocioj Veksilologiaj (FIAV). Temas pri organizaĵo kie renkontiĝas, nuntempe, 52 asocioj kaj institucioj veksilologiaj de la tuta mondo. La celoj de ĉi tiuj asocioj estas disvolvigi veksilologion, komprenata kiel la helpa scienco de Historio, okupiĝanta pri flagoj, standardoj kaj similaj insignoj.



Flago de la FIAV

FIAV naskiĝis fine de la 50-a jardeko. Dum tiuj jaroj multaj novaj ŝtatoj, eksaj kolonioj, atingis sian sendependiĝon. Ofte, la unua decido de ĉi tiuj novaj ŝtatoj estis la adopto de nova propra flago, malsimila al tiu trudita de la metropolo. Aperis tiam, dekoj da novaj flagoj kaj tio pligrandigis la scivolemon pri la origino, signifo kaj historio de tiuj novaj flagoj. Do, disvastiĝis la intereso pri veksilologio. Samtempe fariĝis necese reguli la sciencajn esplorojn pri ĉi tiu temo, ni ne forgesu, ke veksilologio estas help-scienco de Historio.



Depost 1950 multaj novaj flagoj aperis en la internacia socio

En tiuj jaroj, multaj homoj interesiĝis pri flagoj, tamen estis malfacilaj la kontaktoj inter ĉiuj flag-amantoj. Krome, ofte, flagoj estis konsiderataj nur el la patriota vid-punkto, tio estas, oni konsideris flagojn nur kiel simbolojn por elstari naciajn sentojn, ne kiel sciencon por pristudi simbolojn, signifojn, historion ktp, tute marĝene de la patriotaj sentoj de kiu ajn.

Malgraŭ ĉi tiuj malfacilaĵoj, deko da interesitoj kontaktis inter si kaj ili decidis okazigi en la jaro 1965, la 1-an Internacian Kongreson pri Veksilologio en la urbo Muiderberg (Nederlando). Partoprenis en la renkontiĝo dudeko da homoj, ĉefe eŭropanoj, kiuj debatis dum du tagoj nur pri flagoj, Nur unu jaron poste, fondiĝis, ankaŭ en Nederlando, la unua nacia asocio pri veksilologio, al kiu poste aldoniĝis tiu de Francio kaj poste la usona NAVA (Nord-Amerika Veksilologia Asocio), kiu nuntempe estas la plej grava nacia asocio kie renkontiĝas flag-amantoj.

Ĉi tiuj naciaj asocioj decidis en la jaro 1967 fondi, internaci-nivele, la Federacion Internacian de Asocioj Veksilologiaj (FIAV). Nuntempe, al FIAV aliĝis 21 naciaj asocioj, plus deko da aliaj institucioj dediĉitaj al specifaj temoj, ekzemple heraldiko, armeo, protokolo ktp.



Fondiĝo de la FIAV en Rüschlikon (Svisio) 1967

Multaj el ĉi tiuj asocioj eldonas siajn proprajn bultenojn kaj revuojn, ekz. en Argentino "*Estandarte*", en en Kanado "*Flagscan*", en Hispanio "*Gaceta de Banderas*", en Italio "*Vexilla Italica*" ktp. Alia grava laboro de FIAV estas mastrumi imponan datum-bazon en interreto, kie estas eble legi informojn pri dezajno, signifo kaj historio de ĉiuj flagoj en la mondo, ne nur naciaj. Kompreneble ĉi tiu biblioteko pligrandiĝas iom post iom, ĉar novaj flagoj estas aprobitaj aŭ adoptitaj ĉiutage tra la tuta mondo. Nuntempe, ĉe "*Flags of the World*" estas eble legi pli ol 86.000 paĝojn pri flagoj kun 206.000 bildoj pri flagoj.

Sed, kiel dirite, la plej grava celo de FIAV estas favorigi la studojn kaj eseojn pri veksilologio. Tiel, ĉiu dujare oni organizas internacian kongreson kie estas eble aŭskulti prelegojn pri veksilologiaj temoj. Oni organizas ankaŭ vizitojn al muzeoj, ekskursoj ktp. Sendube ni, esperantistoj, trovas similaĵojn inter tiuj FIAV-kongresoj kaj niaj esperanto-renkontiĝoj, ĉefe la Universala Kongreso. La 30-a Internacia Veksilologia Kongreso okazis en Pekino en la jaro 2024, kaj la venonta en 2026 en Parizo.

Kiel kuriozaĵo oni devas diri, ke ĉiu internacia veksilologia kongreso adoptas, post konkurso, sian propran flagon, kiu flirtas ĉe la kongresejo kaj nur dum tiuj tagoj.



Flago de la 30-a Internacia Veksilologia Kongreso
Pekino 2024

Ĉu veksilologia esperantista asocio povus aliĝi al FIAV? Nu, por esti membro de ĉi tiu internacia organizaĵo ne nepre devas esti nacia asocio. Statuto de FIAV disponas, ke kiu ajn veksilologia asocio rajtas peti sian aliĝon al la internacia asocio, kondiĉe ke:

- ĝi devas esti veksilologia asocio, tio estas, organizaĵo kies celo estas priesplori aferojn rilatajn al flagoj.
- Oni devas akcepti la principojn de FIAV, tio estas, favorigi kontaktojn kaj rilatojn inter ĉiuj veksilologiaj asocioj en la mondo.
- La asocio aliĝonta devas esti laŭleĝe fondita.

Sendube, nia onta Veksilologia Esperantista Tutmonda Organizo (VENTO), laŭleĝe fondota, rajtos peti aliĝon al FIAV. Tio sendube estos agnosko por nia internacilingva movado. Do, ni invitas al ĉiuj esperant-lingvaj flag-amantoj partopreni en ĉi tiu bela projekto. Ni laboru ĉi-celen!

**Notu la novan retadreson de la revuo:
vento@esperanto.ac**

# Plie pri duon-hisitaj Esperanto-flagoj

Sur VENTO ni jam pritraktis abunde la aferon pri duonhisitaj flagoj kaj pri kiamaniere montri funebran respekton per E-flago. Tamen, alvenis demando en la redakcion, kiu povas esti interesa. Okaze de funebraj momentoj, kiel devas flirti esperantista flago kiam ĝi troviĝas kune kun aliaj flagoj, ekzemple tiuj de la lando kie okazas kongreso?

Nu, la afero estas grava, pro la fakto, ke evidente nia flago devas montri funebran respekton, ekzemple rilate elstaran forpasintan samideanon. Tamen, ĉi tio ne signifas, ke nacia, regiona aŭ loka flago de la loko kie okazas la kongreso devas agi same. Inverse, se dum renkontiĝo la ŝtato, kie ĝi okazas, dekretas funebran duon-hisadon de flagoj, ekzemple pro katastrofo aŭ forpaso de elstara naciano, kiamaniere agi rilate la E-flagon?

Jen proponantaj solvoj:

• Se dum kongreso la organizantoj decidas montri funebran respekton per la E-flago, kaj nia simbolo troviĝas apude al aliaj flagoj, ekzemple nacia, regiona aŭ loka, NUR la esperantista flago devas resti duon-hisita aŭ porti nigran krepon. Tiel:



Do, la organizantoj de la renkontiĝo ne rajtas duon-hisigi oficialajn flagojn, ili povas fari tion nur rilate la E-flagon.

• Se dum kongreso oficialaj aŭtoritatuloj aprobas normon, laŭ kiu estas devige duon-hisigi ĉiujn standardojn en la ŝtato, regiono aŭ urbo, por montri funebran respekton pro kiu ajn malfeliĉa okazintaĵo, la organizantoj de la kongreso NEPRE devas duon-hisigi ĉiujn standardojn, ankaŭ la esperantistan flagon.



Alie, ni memorigas, ke la flago de Saŭd-Arabio kaj ĝenerale ĉiuj flagoj de islamaj ŝtatoj kie aperas la nomo de Alaho ne povas aperi duon-hisitaj pro respekto al Lia nomo.

Ni rememorigas nun aliajn interesajn aferojn rilate la duon-hisigon de la E-flago. Tiel:

• Ene de fermita loko (ĉambro, salono ktp) oni ne povas duon-hisigi la E-flagon:



***NE!***

• Por montri funebran respekton ene de fermita loko oni devas uzi nigran krepon sur flago ĝis-alte hisita:



***JES!***

• Flirtantaj flagoj ne povas esti sam-tempe kaj duon-hisitaj kaj portantaj nigran krepon. Oni devas elekti unu aŭ alian manieron por montri funebran respekton, sed ne ambaŭ.



***NE!***

# Veksilologia kuriozaĵo

## *Ĉu flago povas konsisti el ŝiritaj pecoj ?*
## *La flago de Zamoro (Hispanio)*

Rektangulaj, kvadrataj aŭ kelka triangula, oni povas aserti, ke ĉiuj flagoj konsistas el ŝtofo, kie aperas koloroj kaj simboloj. Tamen, hispana urbo flirtigas flagon, kiu reale ne estas peco de teksaĵo, sed ŝir-pecoj. Temas pri la urbo Zamoro.

Zamoro troviĝas en la regiono Kastilio kaj Leono, proksima al Portugalio. Ĝi estas urbo kun 60.000 enloĝantoj, tra ĝi trapasas la longa rivero Doŭro. Temas pri belega urbo, konsiderata kiel la urbo de la Romanika Arto en Hispanio.

La flago de Zamoro estas konata kiel la "*Seña Bermeja*" (Ruĝa Simbolo). Ĝi konsistas el naŭ ŝir-pecoj, la plej supra verd-kolora kaj la ceteraj ruĝaj. Tiuj ok ruĝaj ŝir-pecoj memorigas la venkojn de la luzitana militestro Viriato kontraŭ la romiaj trupoj inter la jaroj 147 a.K. kaj 139 a.K. antaŭ ol li estis perfidita kaj mortigita. La supra verda ŝir-peco estis aldonita de la reĝo Ferdinando la Katolika, kiel dankemo pro la kontribuo de la urbo dum batalo en la jaro 1476.



Originala flago de la urbo Zamoro en Hispanio

Lastatempe, oni decidis iamaniere *normaligi* la zamoran flagon el la veksilologia vid-punkto. Tamen, se tiuj naŭ disŝiritaj strioj aperas unuigitaj estas necese enmeti, inter ĉiuj ili, alian plian strion, ĉu blankan aŭ nigran kaj tio ne estus taŭta, pro la fakto, ke la zamora flago estas nur verda kaj ruĝa. Malgraŭ tio, kiam oni rektanguligis la flagon, oni aldonis mallarĝajn nigrajn aŭ blankajn liniojn inter ĉiuj strioj.





Lastatempe aperis versioj de la zamora flago kun rektangula formo. Se tiel, estas necese enmeti inter ĉiuj ruĝaj bendoj mallarĝan blankan aŭ nigran linion. Tamen, tio estus aldoni plusajn elementojn al historia flago, kiuj ne aperis origine.

Alia solvo proponata por normaligi la flagon, estas finigi ĉiun strion per triangula ekstremo, ĉi tiel, iamaniere, oni diferencigas ĉiun ŝir-pecon, kvankam la rezulto ne klare vidigas tiujn ok ruĝajn bendojn.



# La angulo de la blazonoj

## *Kroatio*

La 21-an de decembro 1990, Kroatio aprobis la dezajnon de sia nuna flago, ene de kiu ankaŭ aperas la blazono de la ŝtato. Tamen, ne temas pri moderna simbolo, ĉar ĝia uzo estas dokumentita jam en la jaro 1495. La blazono konsistas el blazon-ŝildo de 25 kvadratoj el ruĝa kaj blanka koloroj, alterne metitaj kvazaŭ en ŝakludilo. Pro tio, en la kroata lingvo, la blazono estas konata kiel *Šahovnica* (Ŝakluda Breto).



Flago de Kroatio



Blazono

Krome, en la supra rando, aldoniĝis kvinpinta blazona krono, kiu konsistas el la kvin plej gravaj historiaj regionoj de la teritorio de Kroatio. Kion signifas tiu kvazaŭ ŝakluda breto?

La plej bela legendo rakontas, ke la kroata reĝo Stjepan Držislav estis kaptita de la Respubliko Venecio, tamen li reakiris sian liberecon dank'al trifoja ŝakluda venko kontraŭ la venecia Doĝo. Sekve, li ordonis, ke la ŝakluda emblemo estu la blazono de Kroatio. Tamen, verŝajne temas nur pri legendo, ĉar la kroata blazono aperis proksimume 500 jarojn poste.

Aliaj asertas, ke tiu sinsekvo de blankaj kaj ruĝaj kvadratoj aludas la historiajn provincojn de Kroatio, tiuj kiuj estas reprezentataj per ruĝa koloro estas fore de la maro kaj tiuj blankaj apud la maro. Tria teorio asertas, ke la vorto *kroato* tre similas al *kvadrato*, do jen la uzo de kvadratoj por paroli pri Kroatio.

# Flagoj kaj poŝtmarkoj:

## *Usonaj ŝtataj flagoj omaĝe al Ducentjariĝo de Usono*




En la monato februaro 1976, la Poŝta Servo de Usono omaĝis la usonan ducentjariĝon pere de eldonado de kompleta bloko da poŝtmarkoj, kie aperas la flagoj de ĉiuj usonaj ŝtatoj. Unuafoje en la historio de la usona poŝta servo aperis tiom da poŝtmarkoj sur la sama folio. Do, ĉiu folio entute havas 50 poŝtmarkojn, kiuj vice aperas laŭ la dato de aliĝo al Usono. Tiel, la bloko komenciĝas per la flago de Delavario, la unua ŝtato kiu aliĝis al Usono, kaj finiĝas per tiu de Havajo. Ĉiuj poŝtstampoj havas saman valoron, tio estas 13 centavoj. Entute oni eldonis 8.720.100 foliojn. Oni kalkulas, ke la nuntempa valoro de ĉiu folio estas proksimume 30 usonaj dolaroj aŭ 28 eŭroj, tio estas pli ol 400-oble la originala prezo de la poŝtmarkoj.



# *Trovu la eraron!*





***Olimpia flago inverse hisita dum de la inaŭguro de la Olimpiaj Ludoj!!!***

Okaze de neniu internacia evento flagoj ludas tiel gravan rolon kiel en la Olimpiaj Ludoj. La spektaklo videblas tra la tuta mondo, tiam la hisado de la Olimpia flago estas unu en la plej gravaj aktoj dum la malfermo de la ludoj. Ĉio estas pensita kaj kalkulita dum la inaŭguro, tamen, lastmomenta eraro povas okazi, ĉefe kiam la olimpia flago estas hisita...inverse!

Inaŭguro de la Olimpiaj Ludoj en Parizo 2024.





Kiel kunlabori kun *VENTO*

- Estas bonvenaj ĉiuj kontribuaĵoj al nia revuo. Se Vi interesiĝas pri veksilologio, ne hezitu sendi al ni artikolojn, informojn, desegnaĵojn, fotojn, ktp. La kontribuaĵoj nepre devas esti redaktitaj en la internacia lingvo esperanto kaj temi pri veksilologiaj aferoj. Se temas pri blazonoj aŭ ĝenerale pri heraldiko, ĉi tiuj simboloj devas aperi ankaŭ ene de flago por tiel konsideri, ke ĝi ankaŭ rilatas al veksilologio.

- Sur ĉiu numero ni aperigos unu aŭ kelkajn fotografaĵojn senditajn de niaj legantoj. Ĉi tiuj fotografaĵoj devas esti originalaj, tio estas, ne povas esti prenitaj el interretaj paĝoj. En tiuj fotografaĵoj devas aperi flago(j). La sendanto devas sciigi pri la loko, kaj se eble ankaŭ pri la dato de la fotografaĵo.


- Okaze de la sendo de artikolo aŭ informo, la aŭtoro devas eviti fari favorajn aŭ malfavorajn politikajn komentojn pri la ŝtato, komunumo, regiono aŭ asocio de la flago. Nia revuo estas tute neŭtrala rilate politikajn aferojn aŭ movadojn.

- La revuo estas tute senpaga, do, pro la sendo de kontribuaĵo oni ricevas nenian kontraŭ-pagon. Kompreneble, la aŭtoro rajtas aperigi siajn personajn datumojn sur la artikolo.

- Memoru, ke nia ret-adreso estas: vento@esperanto.ac kaj nia poŝta adreso:

Revuo VENTO
Apartado de Correos 3142
E-14080 Córdoba (Hispanio)

La adreso kaj la TTT-paĝo estis afable havigita de Andaluzia Esperanto-Unuiĝo. www.esperanto.ac



## Demarŝoj por la laŭleĝa fondiĝo de VENTO

Ni denove proponas la ideon fondi oficiale VENTO-n, kun duobla celo:

- Fariĝi la faka asocio de la E-movado kie renkontiĝas veksilologoj.
- Esti la reprezentanto de la esperanto-parolanta komunumo en la Federacio Internacia de Asocioj Veksilologiaj (vidu paĝon 24an)

Pro la fakto, ke la plimulto el la proponantoj de la ideo fondi VENTO-n estas hispanoj, estus konvene oficialigi la asocion laŭ la hispanaj leĝoj, tamen tio ne estas nepra kondiĉo, ĉefe se aperas alies opiniojn. Tiucele ni jam redaktis proponon por statuto, kiu povas esti sendita al ĉiuj interesitoj, simple sendu mesaĝon al vento@esperanto.ac .

Ni proponas la okazigon de reta kunveno por oficialigi la asocion dum la venontaj monatoj. Se la ideo tenadas vian atenton, same sendu ret-mesaĝon.

Dankon pro viaj apogoj kaj sugestoj !

# Veksilologia Humuro




12ª
HISPANA
KONGRESO DE
ESPERANTO
TARRASA (BARCELONO)
28-29-30 JULIO 1951